Wilhelm Hey,

# Ĉu vi scias la kiomon

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉu vi scias la kiomon
de la steloj super ni?
Ĉiu havas sian nomon,
ilin konas nia Di'.
La Sinjoro, kiu tronas
super ĉio, ilin konas;
|:kaj la nombron scias Li.:|

Birdoj flugas tra l' aero,
ĉu vi scias, kiom da?
Bestoj vivas sur la tero,
estas ege multaj ja.
Dio ĉiujn ekvivigis,
la estaĵojn Li estigis.
|:Ĉiuj bestoj laŭdu Lin.:|

Multaj estas la infanoj,
ĉu vi scias kiom da?
Ĉiuj estas en la manoj
de la kara Dio ja.
Li ja scias la kiomon,
kaj Li konas ĉies nomon,
|:amis ĉiun, ankaŭ vin.:|

*Traduko de la Germana poemo "Weißt du wieviel Sternlein stehen" de* WILHELM HEY *(∗1789-03-26 – †1854-05-19) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 1983.*

*MR-057 / Arg-737-1488 (2012-12-28 23:20:57)*

*La melodio estas aŭdebla en* `http://ingeb.org/Lieder/WeisstDu.html`. *Tie troviĝas ankaŭ angligo de la kanto-teksto.*